

# LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 16.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —  
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso  
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

B. TITTL:

## TRI JARCENTOJ DA SUFERO.

La 8. nov. flugis la pensoj de ĉiuj bohemoj al la plataĵo de Blanka Monto, kie antaŭ 300 jaroj okazis la terura batalo, kiu kaŭzis tiom da sufero al ilia nacio.

Ĝi okazis unu kaj duonjaron post la tago kiam la bohemiaj nobeloj venis en la regan kastelon de Praha por prezenti proteston kontraŭ la subpremado de l'endlanda protestanta religio, direktata el Vieno de tiama aŭstria imperiestro kaj samtempe bohema reĝo el la familio de Habsburgoj, Mathyas, edukito de Jezuitoj, kaj plenumata de katolikaj imperiestraj landestroj Slavata kaj Martinic. Tiam la bohemiaj nobeloj en ekscitiĝo eljetis tra la fenestro la ambaŭ landestrojn eĉ ilian skribiston Fabricius, elektis 30 direktorojn de la lando sub prezido de so. Vilém z Roupova kaj komencis defendi la landon kontraŭ la militistaro de Mathyas. Kiam en 1619 tin ĉi mortis, la bohema protestanta nobelaro rifuzis akcepti por la bohema reĝo lian posteulon Ferdinand II. Habsburga, kaj elektis Falcgrafon Friedrich. Ferdinand sendis kontraŭ la ribeliĝintaj bohemoj kunigintan militistaron katolikan sub la komando de grafo Buquoi. Antaŭ ĝi retriĝadis la bohema militistaro, komandata de la hezitema kaj nekuraĝa princo Anhalt, armeestro de Friedrich.

Dimanĉon, la 8. de nov. 1620, tagmeze, kunpuŝiĝis la armeoj sur la »Blanka Monto« apud Praha. La batalo ne daŭris longe, nur unu horon, kaj tiu horo sufiĉis por kaŭzi preskaŭ plenan ekstermon de la bohema nacio.

Habsburgo Ferdinand II., fervora katoliko, bone sciis puni la ribelon: lunde 21-an de junio-1621 oni senkapigis sur la Malto-vurba placo apud la magistrata domo en Praha 27 sinjorojn. Inter ili estis 86 jara nobelo Kašpar Kaplíř ze Sulevic kaj 74 jara Václav z Budova. Al dro. Jesenský,

rektoro de la universitato en Praha, antaŭ la senkapigo oni eltranĉis langon, al Ondřej Šlik estis antaŭe forhakita mano. — La sango de la martiroj fluis rivere el la ekzekutejo kaj tiu sango ĉiam fluis inter Habsburgoj kaj bohema nacio. — Dekdu kapoj de la ĉefaj ekzekutitoj kune kun la mano de Šlik kaj lango de Jesenský estis en feraj korboj elmetitaj sur la punta turo. Kelkaj kapoj estis je lango alnajlitaj sur la ekzekutejojn.

Sed Habsburgoj ne estis ankoraŭ kontentaj: al 658 sinjoroj ili konfiskis tuĉan havaĵon (preskaŭ 2/3 de tuta Bohemio estis konfiskita) kaj la bienoj estis donacitaj aŭ venditaj al fremduloj, ĉefe germanoj. Bohemfrataj kaj protestantaj pastroj estis ekzilitaj kaj la loĝantoj devis decidiĝi: aŭ akcepti la katolikan kredon, aŭ migri el la lando. Tiam 36.000 familioj foriris el la lando kaj la resto katolikiĝis.

Sed eĉ alie oni priŝtelis la spiritojn: oni elserĉis kaj forbruligis la bohemiajn librojn. Bohema lingvo estis subpremata, la limoj malfermitaj al fremduloj kaj la universitato donita al Jezuitoj. Habsburgoj povis ĝoji: post du jarcentoj la bohema lingvo estis preskaŭ tute ekstermita kaj ĝi nur sonetis jen kaj tie en kabanjoj de mairiĉuloj; la bohema lingvo estis signo de mizerio kaj de sklaveco. Sed Habsburgoj ĝojis vane: la kadavro de la nacio reviviĝis, fariĝis miraklo kaŭzita per amo. Plezumigis la profetdiro de Libuše: »Národ český nekoná.«

ooo

## J. A. COMENIUS.

Krom la jubileo de malfeliĉa batalo sur Blanka Monto la bohemoj preskaŭ samtempe memoras la 250an datrevenon, de la morto de sia fama samlandano Jan Amos Komenský (J. A. Comenius).

La fama pedagogo naskiĝis la 28. marton 1592 en Uherský Brod (Moravio). Lia patro, muelisto Martin Milič naskodevenis

el Komna, laŭ kiu oni lin nomis Komenský (latine Comenius). La gepatroj baldaŭ mortis kaj Komenský kiel 12 jara knabo iris al sia onklino en Strážnice, sed ŝi ne multe zorgis pri li. Komenský okupis sin per diversaj aferoj kaj fine, kiel 16 jara knabo li venis al instruisto Dubina en Přerov, kie li komencis lerni la latinan. Jam tiam li atentis la falsajn instrumentojn, kiuj kaŭzis, ke la instruado eĉ lernado estis tre malfacilaj kaj neagrablaj. En 1611 li venis en la akademion de Herborn, kie li studis tre fervore. Tie li okupis sin ankaŭ per astronomio, sed lia kredo al la biblio estis tiel forta, ke li ne kredis al la doktrinoj de Kopernikus, kiuj kontraŭstaris la doktrinojn de la eklezio. En 1613 li finis la studojn kaj komencis, laŭ tiama kutimo, vojaĝi. Li vizitis Holandon kaj iris al Heidelberg, kie li studis universitaton. Ĉie li ekkonis la falsecon de instruaj metodoj. Poste li revenis en Moravion, kie li fariĝis estro de la bohemia lernejo, kiun li penis perfektigi tiom, ke ĝi donu ĉiujn praktikajn sciojn. Tie li skribis sian unuan verkon boheman »Pri anĝeloj«. En 1616 li fariĝis pastro kaj du jarojn poste li estis sendita al Fulnek, kie li travivis tri jarojn en sia kontenteco. Post la malvenko sur la Blanka Monto (8. nov. 1620) komencis ankaŭ por Komenský tempoj tre malfacilaj. La protestantaj pastroj estis persekutataj kaj Komenský kun kelkaj aliaj bohemiaj pastroj trovis rifuĝejon ĉe nobelo Karel ze Žerotína sen. Tie Komenský skribis kelkajn religiajn librojn kaj sian faman »Labirint světa a ráj srdce« (»Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro«), kiun li dediĉis al sia protektanto. Sed la katolika furiozado ĉiam kreskis kaj so. de Žerotín ne povis plu protekti Komenský.

Komenský trovis novan hejmon en pola urbo Lešno, kie jam de 80 jaroj estis multnombra bohemia komunumo. En marto 1625 li kun siaj kunuloj transiris la landlimojn, premanie al sia brusto kesteton kun iom da tero el tiu patrujo, kiu por li fermiĝis por ĉiam. En Lešno li instruis en la latina lernejo laŭ sia nova metodo. Tie li boheme skribis siajn ĉefajn edukajn verkojn: »Didaktiko aŭ la scio de arta instruado«, »La pordego de la lingvoj malfermita« kaj »Informatorio de la patrino lernejo«. Per tiuj laboroj fariĝis K. fama en la tuta mondo kaj la angla parlamento invitis la scienculon por krei en London scienca akademion laŭ siaj planoj. Kiam pro skota ribeliĝo ĝi ne efektiviĝis, li iris al prusa Elbing, kie li dum ses jaroj verkis latinajn lernolibrojn por svedaj lernejoj. Spite la promesoj de la sveda kan-

celiero neefektiviĝis la permeso por »bohemiaj fratoj« reveni en naskiĝlandon kaj tiel revenis K. en 1648 en Lešno, kie li skribis la kortuŝan »Testamenton de mortanta patrio bohemia« en kiu li elparolas sian konatan profetdiron: »Mi kredas al Dio, ke post forpaso de la uragano de kolero, pro niaj pekoj kondukita al niaj kapoj, la regado de ĉiaj aferoj revenos al ci, ho popolo bohema!« En 1656 trafis K. nova malfeliĉo, ĉar Lešno estis bruligita de Poloj (en svedo- pola milito) kaj li tiam perdis sian tutan havaĵon, kaj multajn manuskriptojn, interalie la preskaŭ pretan »Trezoron de bohemia lingvo«, por kiu li kolektis materialon dum 40 jaroj. Tiel K. venis en 1656 en Amsterdam, kie li laŭ deziro de la senato eldonis kolekton de siaj edukaj verkoj. Sian tiom fruktoričan vivon finis K. post ne longa malsano en Naarden ap. Amsterdam 15. nov. 1670. kaj estas tie entombigita en valona preĝejo. Por la nun tiom aktuala bezono de la mondlingvo estas interese, ke K. dum sia restado en London (1641—1642) verkis libron »Via lucis« (Vojo de lumo) en kiu li interalie esprimas la bezonon de unu komuna helppalingvo, kiun eble povus krei scienculoj.

Estas longa vico da gravaj verkoj de K., kiujn pro manko da spaco ni ne povas citi. Tamen la ĉi tie menciitaj atestas la grandan laboron, kiun li faris al la homaro. Kaj pro tiu ĉi laboro ŝatas K. la tuta mondo, ĉefe la bohemia nacio kiu tiel ameme festas en tiu ĉi monato lian jubileon. La bohemia nacio konstruas al K. indan monumenton en Naarden, sed aliam, pli grandan monumenton ĝi jam delonge konstruis al li — en sia koro. Dr. Silaba.

oooo

## AL KARAJ ĈEĤAJ SAMIDEANOJ!

Al ĉi tiu artikolo, kiun ni akceptis kun vera ĝojo, ni donas jenan respondon: Antaŭ kelkaj monatoj atentis ĉs. ministerio de la nacia kulturo, ke ĉesis ekzisti Hungario kiel geografia koncepto (Hungario estis konglomerato de kelkaj nacioj!) kaj ke por la restanta parto de tiu ŝtato oni uzu la sole ĝustan nomon »Magiaro«. Ĉar ni tute konsentas kun tiu ĉi oponio, ni ĝis nun uzis tiun nomon, sed certe ne kun iu ofendiga intenco, kiun oni povas altrudi nek al ni, nek al la nomita ministro. Cetere ni neniam intencis fari riproĉojn al kiu ajn nacio, ĉar ĝi ĝenerale estas ludilo en la manoj de siaj gvidantoj. Pli ol ĉiu ajn membro de nia nacio ni aprobas la vidpunkton de proz. Masaryk pri amika kunvivo sed ni ne aprobas la malamikan sistemon de la hungaraj regantoj, direktitan kontraŭ nia ŝtato, kiun nove malkovris la Viena »Arbeiter Zeitung«. La hungaraj samideanoj ne dubu ke ni sincere ŝatas ilian **nacion**, kaj ili akceptu niajn salutojn.

Post preskaŭ dujara silento ni denove ricevis la »Progreso« kaj ĝojege ni legis en ĝi pri la progresoj de la ĉefaj esperantistoj! Jam antaŭ ol ni ricevis ĝin, ni sciis, ke tie estas vigla, bone gvidata esperantivivo, kion ni bedaŭrinde ne povas diri pri Hungario, kie oni ne ŝatas nun la »internacian« laboron. Kaj tamen nur per internacia laboro ni povas progresi al ĝenerala tutmonda interkompreniĝo kaj paca kulturkunlaboro de la homaro kaj de ĉiuj nacioj! Ni esperantistoj do ĝojege akceptis kaj subtenis, ke la dektria mondkongreso okazu en Praha, kiu estas tre proksima al ni kien vojaĝi eble ankaŭ nia valuto permesos. Multaj hungaraj samideanoj intercas partopreni la prahan kongreson kaj pruvi, ke inter esperantistoj ne estas baroj, landlimoj kaj diferencoj.

Despli malĝoje ni legas en kelkaj numeroj de la Progreso, ke la ĉefaj samideanoj eble tro forte mencias la magiaran subpremadon en Slovakio. Karaj samideanoj. Ankaŭ mi estas »magiaro!« Kvankam la praa latidevena vorto la internacia esprimo por la hungaroj estis ĉiam »hungar« ne nur geografie, sed ankaŭ etnografie, kaj la hungaroj, kvankam hungare ili mem nomas sin »magyar«, tamen, klerigis kaj ofendon sentas, se eksterlandano uzas tiun ĉi vorton. (Mi konsentus eble, ke anstataŭ »hungaro« oni diru esperante laŭlitere »magiaro« aŭ »magjaro«, sed la plimultego certe neniam. Cetere eĉ »magjaro« ŝajnas esti kripligo de la originalvorto!) Do mi petas, ne uzu ĉi tiun vorton! Se vi pli ŝatas la vorton »ĉeĥo«, el »ĉeĥemo« aŭ opinias, ke tio estas pli bone etnografie, ni akceptas tiun ĉi vorton, sed ne volu vi la vorton »hungaro« anstataŭigi per alia. Tiun ĉi vorton efektive oni uzis en germana, ŝlava ktp. lingvoj nur, se oni volis skribi ofendige, kaj ĉi tion vi tamen nepre ne volas!

Kaj ankoraŭ ion: Ne forgesu, ke la Habsburka redago subpremis dum jarcentoj ankaŭ la hungarojn, kaj kiam oni per hungaraj regimentoj faris »ordon« en la ĉeĥa urbeto, samtempe per ĉeĥa regimento, ĉefaj oficiroj kaj oficistoj plenumis la imperiestrajn ordencojn en Hungario! Ne estas miro do, se laŭ la prahabsburka praktika metodo oni regis super ni konstante per la reciproka konstanta malamiĝigo de la popoloj de la monarkio. Tia sistemo devis gvidi al tio. Sed nek vi, nek ni, nek la popolo estas kulpebla pro tio! La Habsburkoj poste paciĝis kun la hungaraj magnatoj, al kiuj aliĝis kanitalistoj kaj aliaj estroj. Tiuj laŭ viaj skriboj subpremis la slovakojn, vere! Sed ili same subpremis la hungarojn. Kaj se la hunga-

roj havis pliajn rajtojn, nature ili ne povis ion akiri por aliaj nacioj!

Eble kelkaj laŭtigas ĉiulande siajn voĉojn, se oni eksilentigas ilin, kaj la amaso ĉiam silentas kaj suferas kaj humiligas antaŭ kia ajn regado pro kia ajn signovortoj kaj ideoj! Ĉi tion pruvis ĵus la lastaj jaroj! Ĉu popolo estas pro tio kupla? Laŭ nia opinio ne? Ĝi estas tro malforta. La unuiga forto de la popolo estas direktita ĝuste per la subpremantoj! Nu, ni ne politiku ĉi tie!

Certa estas nur tio, ke ni esperantistoj ne estas kulpaj nek pri estintaj, nek pri estontaj subpremoj kaj bataladoj kaj ne havas influon ŝanĝi eĉ nur literon en la kontraktoj inter la ŝtatoj! Do estus bedaŭrindega, se ankaŭ ni malpaciĝus! Se iu esperantisto, ĉu ĉeĥa ĉu hungara disvastigas ian priskribon, kiu atakas aŭ akuzas alian popolon, li faras tion plej ofte ne pro malamo, sed pro amo al la naskiĝtero! (Multaj »magiaroj«, ankaŭ esperantistoj naskiĝis en urboj nun ĉeĥoslovakaj! al tiuj same ŝloras, ke ne la hungarajn kolorojn flirtigas tie la vento, kiel al vi doloras la germana lingvo eĉ ofte en via ĉefurbo mem!) Plej ofte oni disvastigas tiaĵojn nur por montri, ke Esperanto estas ne kontraŭnacia, sed kontraŭe uzebla por tiaj celoj ankaŭ kaj nur por altiri la publikan rigardon kaj oficialan helpon por nia movado! La esperante eldonitaj oficialaj alvokoj restos ĉiam valoraj dokumentoj laŭ vidpunkto esperantista! Cetere ilia ĉiulanda reciproka diskonigo ne nur baras, sed kontraŭe ofte klarigas kaj klarigon alvokas pri la situacio vera!

Neniam staris tiel forte la muroj de miliaroj inter la hungara kaj ĉeĥa popoloj dividitaj! Ni eĉ ne povas reciproke interrilati direkte kaj senpere! Sed ni montru, ke por ni ne ekzistas malamo, ke ni obiekteve, homarane rigardas super la nuntempaj abismoj kaj ni helpu kune al efektiviĝo de fratĉirkaŭpreno en Praha, por montri al la ankoraŭ ĉiam militanta mondo la veran, solan vojon al repacigo kaj interkompreno!

Post la dektria kongreso ni intencas aranĝi en Budapeŝt postkongreson por ankaŭ al nia popolo montri la interfratigan kulturpovon de Esperanto. Ĉu la politika, vojaĝa situacio, ĉu niaj fortoj permesos kaj obligos ĉi tion, ni ne scias certe, sed ni volas ĝin provi kaj ni petas al tio vian helpon kaj kunlaboron same, kiel ni volonte kunhelpas kaj volonte propagandas por la kongreso en Praha! Se ni, al kiuj markas ne la geografiaj teritorioj, sed la de tie ne venataj hejtmaterialoj kaj aliaj fabrikoj, eble uzas fortajn esprimojn en nia ga-

zetaro (mi ne aprobas ilin!) Vi devas kompreni kaj pardoni tion, same ni komprenas viajn ĝisnunajn priskribojn! Sed ni provu tamen kunlabori por nia komuna celo: por la bono de la homaro, do por viaj popoloj per Esperanto por Esperanto!

Frate via hungara samideano.

Vera Nurhom.

## ESPERANTISMO

### XIII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

en Praha (Ĉeĥoslovakujo).

#### II. Komuniko.

Por ke la fakaj kunvenoj, okazantaj dum la kongreso, havu sukcesan rezulton, estis de la loka kongresa komitato komisiitaj jenaj organizantoj, kiuj kun la interesemuloj jam de nun prizorgados la programon de la fakaj kunvenoj eventuale prilaboros la proponon pri la tiurilataj fakaj vortaroj: por blinduloj: St. Stejskal, fervojistoj: fino S. Dlouhá, instruistoj: fino J. Šupichová, ĵurnalistoj (verkistoj): B. Weiner, kuracistoj: Dro. A. Bisčitzky, laboristoj: J. Šidlo, liberpensuloj: R. Hromada, pacifistoj: fino M. Moudrá, poŝtoficistoj: fino M. Hemerová, ruĝa kruco: V. Kraus, skoltaj: A. Pitlik, studentoj: M. Lukáš. Por la aliaj fakoj estos la organizantoj ankoraŭ fiksitaj.

La kongreso okazos en aŭgusto. La preciza dato kaj la kotizaĵo ne estas ankoraŭ fiksitaj. Komitatano, estis elektita Dro. St. Kamaryt, profesoro de ŝtata reallernejo en Bratislava.

Dum la kongreso oni aranĝos operon en la Nacia teatro, esperantan teatran prezentadon, akademion, internacian balon en naciaj kostumoj (Ĉeĥoslovakujo estas lando de la plej abundaj ĝis nun portataj naciaj kostumoj!) kaj ekskursojn al la unuarangaj vidindaĵoj.

Aliĝis: 1. Sino Isbrücker kaj 2. Dr. Isbrücker—Ilago, 3. Pastro Wirth kaj 4. fino Ressel — Höflitz, 5. B. Straka — Bratislava (Ĉeĥosl.), 6. I. Krestanoff kaj 7. Sino Krestanoff — Pirdop (Bulgarujo), 8. S. Degenkamp — Utrecht (Nederl.).

Por gajni monrimedojn aranĝos L. K. K. publikajn teatrajn prezentadojn. La unua okazos la 19. XI. 1920. — Greka-katolika pastro Stefan Varzaly el Lansfort (Pensylvania — Usono) donacis 100 Kč por la kongresa kaso.

En la konkurso de Esperanto, organizata de so Deligny en majo 1921 por la lernantoj en la liceo de Saint Omer (Francujo) estas unua premio: »Vojaĝo al la XIIIa en Praha kaj rekompenco de ĉiuj elsezoj dum la kongres-semajno.« Vivant sequentis!

Esperantaj gazetoj estas petataj represi ĉi tiun komunikon, sendi unu ekzemplon al L. K. K. kaj sciigi, ĉu ili estas pretaj publikigadi fotografiajn de Praha kun mallongaj priskriboj.

Ĉiun korespondadon kaj oficialajn (por respondo aldonu stampitan respondekupnon aŭ afankon en naciaj poŝtmarkoj!) sendadu al: Augustin Pitlik, ĝener. sekr. de L. K. K., Praha III., Nerudova 40.

Loka kongresa komitato.

Ĉiuj gesamideanoj kaj esperantistaj korporacioj en Ĉeĥoslovakujo estas en intereso de la plena sukceso de la XIIIa petataj pri ĉiuj siaj agoj koncernantaj la XIIIan Universalan kongreson de Esperanto 1921 en Praha tuj informi la Lokan komitatanojn, eventuale pli frue postuli ĝian tiurilatan bontrovon. Precipe estas konsilinde ne presigi artikolojn rilatantajn la aranĝon de la kongreso kaj ĝiaj entreprenoj sen scio kaj aprobo de la L. K. K., al kiu oni sendadu ĉion, interesan.

Ĉiuj bonaj proponoj estas kore akceptataj.

Aug. Pitlik,  
ĝener. sekr. de L. K. K., Praha III.,  
Nerudova 40.

oooo

### BABILADO PRI LA KONGRESO.

La esperantista vivo en Praha de post la konstituigo de la Loka kongresa komitato havas tre vigan karakteron. Ĉiuj esperantistoj vere laboregas en diversaj laboraj sekcioj, gvidataj nur de unu ideo t. e. sukceso de la XIIIa.

Ĉiuj izoluloj, kiuj de post kelkaj jaroj evitadis la esperantistan societon, vizitadas nun regule la klubajn kunvenojn, disponigante siajn fortojn al la L. K. K. En la kursoj gvidataj de so Hromada kaj fino Šupichová sin prempuŝas multege da scivolemaj kaj entuziasmaj geleruntuoj, kiuj fariĝos baldaŭ batalantoj por nia kara lingvo.

Por pliriĉigi la kongresan kason kaj doni al la esperantistoj de Praha okazon sin reciproke pli bone ekkoni oni aranĝos regulajn publikajn teatrajn prezentadojn. La unua okazos la 19. XI. en la teatro de Svanda, kie la aktoroj ludos komedion de Em. Földes »Lilly Grünová«. Nur dank' al la propagademo de la financa sekcestro so Hromada kaj de lia »junularo« oni forvendis jam preskaŭ ĉiujn biletojn! Pro la sama celo aranĝas la junularo de la Esperantista klubo (fino Vlčková, so Waldstein k. t. p.) la 6an de decembro en Svatováclavská záložna amuzvesperon, ĉe kiu prezentos donacojn al ĉiuj bonkonduktaj plenaĝaj infanoj sankta Nikolao, kiun oni sukcesis varbi por Esperanto.<sup>4</sup> (Ne malsekretigu tion, mi petegas al so Chaloupecký, kiu tuj superŝutus lin per la tuta vagono da idistaj flugfolioj!!). —

Rondeto de Esperantistinoj, kie kolektiĝas ĉirkaŭ sia amata »patrino« fino Šupichová aro da modestaj samideaninoj, preparas festeton de Comenius, por montri al la neesperantista publiko, ke Ĉeĥo »instruisto de nacioj«. Comenius estis la unua, kiu rekomendis krei artefaritan helplingvon.

Sed eĉ la esperantistoj en la provincoj kaj fremdlando ne estas maldiligentaj rilate al la ĵorkongresa propagando. Viva korespondado de la L. K. K. estas ties pruvo. Bedaŭrinde ke ne ĉiuj proponoj estas efektivegeblaj pro la

mallongeco de la kongreso (tuta semajno?) kaj ankaŭ financaj kaŭzos.

Laŭinda estas la propagandmaniero de la »Ligo de germanlingvaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakio«, kiu elpendigis en multaj urboj allogan afiŝon kun jena germana teksto: »Lernu Esperanton! Elprovu ĝin dum la XIIIa Universala kongreso de Esperanto 1921 en Praha. Ĉiuj naciej de la mondo estos reprezentitaj.«

Estas ĝojiga fakto, ke ĉiuj esperantistoj en fremdlando jam de nun klopodas por la diskonigo de la venonta kongresurbo, ke ĉiuj septas, ke la sukceso de la XIIIa estas ankaŭ sukceso de ilia internacieo!  
S.

## DIVERSAĴOJ

**La kongresaj laboroj por la XIII. bone progresas,** kiel oni povas juĝi el la oficialaj raportoj de la Loka Kongresa Komitato. Ni jam sciigis multon pri la aranĝo de la XIII., sed ni devas silenti pri tio. La »Lokoko« malpermesas paroli antaŭtempe! Ni nur diras, ke la XIII. estos unu el la plej brilaj kongresoj. Niaj Parolanoj estas senlaciaj, so. Pitlik eĉ aliaj ne konas laciĝon por kontentigi ĉiujn alvenantojn. La multnombra vizito de la kongreso estos por ili la sola rekompenco — sekve: ŝparu por la vojaĝo!

**Nova sukceso de Esperanto.** En Bruxelles okazis la Universala kongreso de la Tutmonda unuigo de Internacia Universitato, kiu ĉeestis eminentaj scienculoj el la tuta mondo. Oni tie paroladis en la lingvoj franca, angla, hispana kaj esperanta. Esperante paroladis dro. Waanverts, univ. prof. el Lille, pri la uzado de radiumo en la kuracarto kaj dro. Corret el Parizo pri radiotelegrafio. Multaj neesperantistoj konstantis, ke ili komprenis pli bone la esperantajn ol la nacilingvajn paroladojn, prezentitajn de alilandaj oratoroj malbone elparolanta la por li fremdan lingvon. Tial oni unuanime (kontraŭ unu voĉo rekomendinta la francan) akceptis la jenan deklaron: »Konstatante ĉiam kreskantan bezonon de internacia helpa lingvo, la Tutmonda kongreso de Internaciaj asocioj esprimas la deziron, ke ĉiuj, kiuj konfesas tiun necesecon, aliĝu al la movado celanta disvastigi Esp., por realigi tiun grandan progreson, prokrastante ĉiun plibonigon, kiu montriĝus necesa, ĝis la tempo, kiam la internacia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj.«

**Grava vneko de Ido!** La eminenta idisto so. Chaloupecký paroladis la 26. X. en Žižkov pri la lingvo internacia antaŭ la alveninto tie' efektente, ke 2 (du) knaboj lasis sian enskribi en la aranĝotan kurson de Ido. Li menciis afable, ke esp-istoj havas ankaŭ sian gazeton: La Progreso, kiu »ankoraŭ« aperas. Laŭdante sian ideo li diris: Al homoj ni donas instrumenton (Idon), lingvon, kaj ili per ĝia helpo eĉ ŝtelu, mortigu. Nia lingvo estas servisto de ĉio, malativa maŝino de la kulturo. Vi aŭdos pri bataloj, kiuj estos ĉefe dum la kongreso. Nun ni kunvokos rilatan enketon, (kiel potenca sinjoro estas tiu Chal.) Habrman estas favora al ni, li promesis tradudi ĉion. — Ni ne tradukas verkojn, ĉar ĝi ne estas necese. En idon oni

povas traduki ĉiun sciencan tekston, en Esp. ne . . . ktp. — Li menciis ankaŭ idistigon de so. Lorenz, kvankam estas jam konate, ke tiu sinjoro ne estas plu idisto (vidu Progreson no. 7. 1920). Sed unu mensogo jam facile malaperos en la tuta marĉo le Viaj mensogoj, ĉu vere so. Chaloupecký? Sed pri eksministro Habrman tamen ne mensogu!

**»Liberiga Stelo« al la Internaciistoj!** Kiu volas rapidigi la triumfon de Esperanto en la laboristaro; enirigi lumon kaj sanan spiriton en la esperantan movadon; helpi la eldonadon de literaturo internacie kuniga; unuvorte labori je la kreado de sennacieca — ununacia — popolo, tiu senprokraste aliĝu al »L. S.« kaj abonu ĝian oficialan organon: Esperantista Laboristo.

Statutoj kaj pronumero estas riceveblaj interŝanĝe de 1 stampita resp. kupono (aŭ alio samvalora) adresota: 23 rue Boyer, Paris XX.

**Esperantský zpravodaj** estas la nomo de la bona propaganda gazeto en bohema lingvo, kiu nun aperigas kaj redaktas nia fervora kaj senlaca amikino f-ino. J. Šupichová (Praba II., 2032). Ni vere ĝojas pro apero de tiu revueto, tiom pli, ke ni kelkfoje aŭdis riproĉon pro unulingva teksto de nia gazeto, kiu tial ne estas komprenata de tiuj, kiuj interesiĝas pri E. Tial ni deziras al ĝi tre bonan prosperon.

**Esperanto kaj la komerco.** La komerca gazeto »Naše obchody« en Hradec Král. n. L. nun sciigis, ke ĝi aranĝas kurson de Esp. kaj preparas vicon la paroladoj pri la komerco kaj E. prezentotaj en ĉirkaŭaĵo. Ĝi ankaŭ aranĝas migrantan esp. ekspozicion kaj petas donacon de diversa materialo.

**El nia familio.** Nia bona samideano si. Jan Mráz edzigis je samideanino fino. K. Kaufmanová. — Nia malnova kolego so. Xaver Kučera, redaktoro el Rakovník kaj fino. Zd. Lendrová, filino de lernejdirektoro el Bystrice ap. Teplice, festos sian civilan geedziĝon la 20. t. m. en Rakovník. — Al la ambaŭ paroj ni esprimas sinceran deziron de plena feliĉo en la nova vivo! — Son. Rud. Hromada, ĝen. sekret. de ČAE, trafis dolora perdo: mortis lia fileto Jeníček. Oni entombigis lin la 30. X. sur la tombejo de Bubeneč. — Ni esprimas al li niajn simpatiojn kaj kondolencojn.

## KRONIKO

**Kvankam la sekr. de Č a e.** S-ro. Hromada akceptis la redaktadon de tiu ĉi kroniko nur por helpi al la redakcio kaj servi al la legantoj de Progreso per detala kaj kompleta bildo de la movado, tamen la redakcio eldonis la 7 kaj 8 n-rojn tute sin ne interesante pri la Kroniko, kies manuskripto povas ja esti pretigitaj nur la lastan tagon antaŭ ol ĝi estas ironta en la presejon. Ĉar Progreso aperas neregule, estas necese informi pri apero de ĉiu numero. La komitato de Č. Asocio E. informas la membrojn, ke la nova jaro estos akceptita alia aranĝo, kiu ebligos ĝustatempan kaj pli regulan raportadon. Unuavice estos proponite, ke la Progreso aperu en 1921 en Praha, ĉar ne nur laboroj de Č a e, sed ankaŭ tiuj de la Kongresa Komitato nepre postulas tion.

**Aliĝoj** al Ĉ. Asocia E. sendu al la sekr. Rud. Hromada, Praha-VII. Sochařská, 333, kiu sendos ankaŭ poŝtan transpagilon (složenku poŝt. spoř.) por povi pagi la kotizaĵon). 10 K por izoluloj, 2 K por membroj de grupoj. Pro tio ne sendu la monon poŝtmandate, ĉar tio nun estas tro multekosta.

**Ĉiuj grupoj** kaj sam-oj estas insiste petataj regule informi la Asocion pri la kursoj, paroladoj, gazetaj artikoloj ktp.

**Enketo pri oficiala instruado de E.** (Vidu Esperanto, julio-aŭgusto 1920, p. 148). Ĝis nun venis respondoj el Finnlando (V. Setälä), Britio (Page), Svisio (Thonney, Jacquillard), Germanio (Sohrmann, Schmidt), Francio (Deligny). Samideanoj, sendu pluajn informojn, la afero estas grava, la finan rezultaton ni donos al dispono de ĉiuj naciaj societoj.

**Ekzamena komisiono de Ĉae.** Specialan kurson por kandidatoj gvidis en aŭgusto S-ro Hromada. La ekzameno okazis la 30 aŭgusto. La ateston pri la kapableco instrui esp-on en lernejoj kaj kursoj ricevis S-roj O. Ginz, Fr. Smeták kaj F-ino Boj. Vlčková. La ateston pri scio de esp-o ricevis S-roj V. Procházka, Fr. Dejmeš, Jiří Bohutinský, Fr. Šolta, F-inoj A. Hodůková kaj M. Homerová. La venonta kunsido de la komisiono la Kristnaskon. Informojn sendas Dr. Stan. Kamaryt, prof. de reallernejo en Bratislava, Tělocvičná 3. — Pri la ekzamena komisiono por Moravio venis ankoraŭ neniu sciigo nek propono.

**Liberpensula Kongreso en Praha** okazis la 5—9 de septembro 1920. Partoprenis el fremdlando sole ĉ. 50 p. En la tria kunveno S-ro R. Hromada prezentis proponon de francaj, belgaj kaj ĉeĥoslovakaj liberpensuloj-esp-istoj, ke la Libera Penso akceptu E-on por siaj internaciaj kongresoj kaj korespondado. Franca delegito, prof. Hubbard proponis la francan por tiu celo. Ambaŭ proponoj estis de la prezidanto transdonitaj al la Generala Konsilantaro de la L. P. Ĉio nun dependas de la laboro de diversnaciaj sam-oj-liberpensuloj. Antaŭ la XIIIa en Praha la Internacia Societo de Liberpensuloj nepre devos esti reorganizita. Oni skribu provizore al S-ro Rud. Hromada, adreso supre.

**Inĝenieroj kaj E-o.** La 5/11 S-ro inĝ. V. Kroužil, prof. de la industria lernejo en Brno parolis en la membra kunveno de Spolek architektů a inženýrů (Societo de inĝenieroj) en Praha pri E. Li ankaŭ eldonigis en speciala broŝuro ĉeĥan tradukon de la angla broŝuro de inĝ. T. J. Guéritte: Esperanto, internacia lingvo de inĝenieroj. La bonegan propagandaĵon ni varme rekomendas al ĉeĥaj propagandantoj. Havbla ĉe S-ro Vincenc Kroužil, prof. de industria lernejo en Brno.

**Foto en Praha** — pro malfrua tempo — ne uzis aŭtune la servojn de E.; oni intencas tion fari printempe.

**Nova propagando.** ĈAE aliĝis al la sama tema kaj samfaka propagando proponita de la Germana E. A. (vidu Esperanto 1920 p. 149). Bedaŭrinde neebleco informi ĝustatempe niajn grupojn pere de tiu ĉi gazeto, kaŭzis, ke nur en Praha kaj Pardubice estis senditaj la instigleteroj kaj nur al komerckomizaj societoj. La Asocio atentigas ĉiujn grupojn pri tio, ke dum

januaro ĝis marto 1921 la samtaga propagando estas daŭrigata por jenaj fakoj: filatelistoj, instruistoj, virinaj unuigoj, tramvojistoj, doganistoj. La grupoj volu interkonsentiĝi pri tio kun la sekr. de ĈAE.

**Fervojistoj kaj E.** La direkcio fervoja en Olomouc (Moravio) rekomendis lerni esperanton atentigante pri la XIII kongreso en Praha. La samon faris la urbestro por policanoj kaj tramvojistoj.

**I. membra kunveno de ĈAE.** okazis en Praha la 28./6. dum Sokolaj festoj. Partoprenis Dro Maruzzi el Zagreb (Jugoslavio), Eliovič el Ĥarkov (Rusio), plue samideanoj el Ĉervený Kostelec, Hradec Král., Plzeň, Pardubice, Přelouč, Běrunice, Brno, Olomouc, Bratislava, Vídeň E. Klubo de Praha (22m), E. Rondeto (10m), entute 57 p. S-ro Dro Maruzzi rakontis pri vigla esperantista vivo en Zagreb. S-ro Hromada, kiel ĝen. sekr., parolis pri la stato kaj ĝistiamaj laboroj de ĈAE.

**I. labora kunsido de orientbohemiaj esp-istoj** okazis la 29./8. en Hradec Králové, kie la saman tagon fondiĝis E. Klubo (prez. S-ro Otto Sklenčka). Partoprenis 37 p.: El Praha 2, Pardubice 5, Přelouč 2, Ĉervený Kostelec 4, Skřivany 4, Třebechovice 2, Dvůr Králové 2, Jičín, Starkoč, Kopydno, Jilemnice, Hradec Králové 14. Decidoj: Estis starigita orientbohema regiono limigita per fervojoj Jihlava, Čáslav, Kolín, Chlumeč, Bydžov, Paka N., Dol. Branná, Hostinné, Trutnov, Znojmo. Estas starigita adresaro de samideanoj de tiu regiono por plifaciligi la propagandon.

**II. labora kunsido okazis** la 24./10. en Pardubice. Partoprenis 50 p. el 16 lokoj. El Praha 1, Pardubice 17, Hradec Král. 6, Přelouč 6, Skřivany 3, po 2 el Ĉervený Kostelec, Ústí n. Orli, Chrudim, Moravany, Dvůr Král., Kladruby, po unu el Parník, Třebechovice, Česká Skalice, Černá, Rosice, Matene Sro Sklenčka pro E. K. Hradec metis florkronon sur la tombon de Dro Schulhof, poste Dro Fousek, advokato el Přelouč faris propagandan paroladon: Opinio de J. A. Comenius pri la L. I. Antaŭ ĝi F-ino Fialová deklamis poemon de Dro Schulhof pri Comenius, post ĝi kantista societo »SUK« prezentis pian himnon. En la posttagmeza laboro kunsido (tute en Esp-o) Sro Sklenčka kaj reprezentantoj el diversaj lokoj raportis pri la laboro farita ĉe ili en la lastaj du monatoj. Sro Hromada el Praha raportis pri la laboroj por la XIIIa kaj pri la Asocio instigante aliĝadi al ĝi, ĉar nur forta organizaĵo garantigas sukcesan propagandon.

XIIIa kunveno okazos la 12./12. en Ĉervený Kostelec. Skribu el Sino Berta Keyzlarová, tie.

**Paroladoj.** Praha. S-ro dir. Eiselt en du mezlernejoj. Same S-ro Bouška. En Přelouč Dro Fousek kaj Inĝ. Berger. En Ĉerv. Kostelec F-ino Šupichová la 28./7. En Přívoz (Moravio) F-ino Janalíková (90 p.). La sama en Valaš. Měziříč en kursoj por instruistoj, pri J. A. Komenský kaj L. I.

**Kursoj.** Praha. Ĉ. Informejo Esp-ista (Sro Hromada) du publikaj kursoj (120 p.) en lerneja ĉambro u Jindřicha. Dvůr Král. en lernejo de la Libera Penso, 32 p. Přelouč Dro Fousek 24 p. En Pardubice instruas Inĝ. Berger

en Husova škola 28 p. En Červ. Kostelec instr. Sino Keyzlarová 60 p. en Kladruby ap. Přelouč 32 p., Budžov Sro Nosek 20 p., Hradec Král. 4 bursojn (126 p.) gvidas Sro Slenička. Plzeň. En kurso de E. K. en la Instruistina edukejo 53 p. instr. mardes kaj vendrede Sro Tittl. En 2 kursoj de Laborista societo en la Laborista Domo instr. Sro Pech. Škvrňan, ap. Plzeň. Dimanĉan kurson por 48 p. gvidas Sro Tittl.

**Vizitoj.** En junio vizitis Praha Dro Maruzzi el Zagreb. En aŭgusto Sro Susmuth el Ameriko vizitis Liberec kaj Pardubice. La franca samideano Sro Delanoue el Namur estis gasto en Praha, Olomouc kaj Bystřice p. H. kaj donis al ni unuajn sciigojn pri la Haaga kongreso. En la komenco de novembro pasis tra Praha bulgara samideano Krestanoff kun sia edzino kaj filineto, revenante el Svisio tra Haag kaj Dresden en Pirdop (Bulgario).

Rud. Hromada.

### PLI DA KUNSENTO!

Inter kelkaj riproĉoj al la redakcio (vidu la Kronikon), so Hromada anoncas, ke »estos proponite, ke la Progreso aperu en 1921 en Praha«. Rigardante al la malutiloj, kiujn kaŭzis al nia movado la koncentriĝo de nia tuta propadando en unusola urbo, mi protestas energie kontraŭ la intenco enkonduki la novan centralismon, kiu alie signifas transdonon de la tuta povo al du, tri personoj, kaj tiel la tuta movado fariĝas kvazaŭ ilia posedaĵo. Mi opinias, ke la potenco donita al niaj Prahaj samideanoj estas pli ol sufiĉa, tiel, ke ne estas necese peni pri ĝia pligrandigo — malprofite al kluboj alirubaj. Ili konsideru, ke pri la tuta Ĉ. A. E. decidas nur ili, ke ili formis Ekzamenan komisionon, kiu konsistas nur el Prahanoj, kvazaŭ alie ne ekzistus perfekta esperantisto, kaj ili certe venos al la konkludo, ke la preno de »La Progreso«, la sola entrepreno, kiu ne estas plene en iliaj manoj, estus la supro de la maljustaĵoj kontraŭ alirubaj esperantistoj.

So Hromada riproĉas malregulan aperadon de la Progreso (pri kio ni cetere konsentas), sed li forgesas, ke la esp. gazetoj, kiujn oni eldonadis en Praha, aperadis multe pli malregule. Tamen por kontentigi lin mi anoncas, ke de la Novjaro Nia presejo posedos du novajn kompostmaŝinojn, kiuj ebligos pretigi nian gazeton dum du tagoj post la transdono de la manuskriptoj.

So H. diras, ke la laboroj de Ĉ. A. E. nepre postulas la lokumon de la Progreso en Praha (ĉu ne povas diri pri si la samon eĉ la kluboj?), kvankam la komitato preskaŭ ne kunvenas. (De la fondiĝo de Ĉ. A. E. mi estis nur dufoje invitita al ĝia kom. kunveno!).

Pri la bezonoj kongresaj ni jam traktis kun ĝen. sekret. so Pitlík kaj ni esperas, ke kun tiu ĉi serioza sinjoro ni laboros en plej bona konkordo. La sola peno de la esperantistoj en Plzeň ĉiam estis servi al la esperantismo de nia lando kaj al nia nacio, kaj defendi la progreson de nia movado. Ke ili estas sur bona vojo, tion pravas iliaj sukcesitaj iniciativoj: unuiĝo de ĉs. esperantistoj en unusola centro, apero de nia gazeto, kiu havas pli da abonant-

oj ol ĉiuj esp. gazetoj aperintaj en Praha kaj fine: la XIII. en Praha.

Ĉiun nian povon ni volas dediĉi al ĝenerala intereso de ĉs. esp. movado kaj ne al bagatelaj malpacoj kaj bataloj pri potenco, kies klasika sidejo estas Praha, kaj kiuj alkondukis antaŭ la milito nian movadon al preskaŭ plena pereco kaj tial mi vokas al ĉiuj: havu pli da samideana konsento!

B. Tittl.

### ALVOKO.

Kiel en aliaj grandaj urboj, tiel amasiĝis post la mondmilito ankaŭ en Praha granda nombro da loĝantoj. La sekvo estas eksterordinara manko da loĝejoj. Tium malbonon komencis multaj senkonsciencaj domposedantoj eluzadi plialtigante la lupagojn tiel, ke oni devis eĉ per novaj loĝoj kaj ordonoj kontraŭstariĝi. Krom tio ekzistas en Praha »Societo de loĝejuantoj«, kies tasko estas protekti la membrojn kontraŭ la domposedantoj kaj domservistoj, laborantaj konkorde por ekspluati la loĝejuantojn en ilia nuna ĉagrenplena situacio. La nomita societo klopodas per ĉiuj tie ĉi konataj moralaj rimedoj; sed opiniante, ke similaj cirkonstancoj trovas sin ankaŭ en aliaj landoj kaj urboj, ĝi petas, ke niaj samideanoj almenaŭ malŝonge komunkigu al ĝi metodojn kaj manierojn, kiujn oni tie aplikas por ŝirmi la loĝejuantojn kontraŭ la malutilaĵoj devenantaj de la du diritaj kastoj.

Afablajn sciigojn oni petas sub adreso: Spolek nájemníků, Král Vinohrady, Korunní tř. 71, Bohemujo» kaj oni estas pretaj al reciprokaj servoj.

La esp. redakcioj estas petataj represiti tiun ĉi alvokon en siaj ĵurnaloj kaj gazetoj.

### ONI LAŬDAS.

So. G. Delanoue, Del. de U. E. A. en Nemours (S. et Sn.) Francio, tre sincere dankas al Gesoj. Hromada kaj so. Bouška, en Praha, al finoj. Tošnarová, en Blansko, Janalíková, en Bystřice nad Hostýnem, al soj. Neužil, en Olomouc-Nerédin, Kudela kaj Mastný, en Olomouc, pro iliaj tre sindonemaj akceptoj kaj tre utilaj servoj dum liaj vojaĝoj kaj restado en Ĉeĥoslovakio.

### DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresado kosta 2 Kč.)

**Plzeň** (Ĉeĥoslovakio). So. Karel K h e l, Božkovská 40-III. Deziras koresp. kaj ŝanĝi p. m. kun amikoj kaj amikinoj en ĉiuj landoj. Markojn bildflanke.

**Plzeň** (Ĉeĥoslovakio). So. Jaroslav K o t r b a, Koterovská 41-III. Deziras koresp. kaj ŝanĝi p. m. kun amikoj kaj amikinoj en ĉiuj landoj. Markojn bildflanke.

**Plzeň** (Ĉeĥoslovakio). So. Bohuslav P e e k a, Nepomucká 51, interŝanĝas il. k. kaj poŝtmarkojn. Markojn bildflanke.

**Plzeň** (Ĉeĥoslovakio), Nepomucká tř. — So. Jos. H y l a k dez. koresp. kun fremdlandanoj.

**Hčice** (Bohemio), So. F. N á l e v k a, obchodní akademie, dez. koresp. kun ĉiuj landoj.

**Hořice** (Ĉeĥoslovakio), Otakarova 528, — So. Bed. Munzar, dez. koresp. per il. p. k. kaj l. Respondas ĉiam.

**Hcražd'ovice** (Bohemio), So. Jan Duchoň, koresp. per il. p. k., interŝanĝas p. markojn kun fremdaj samideanoj. Respondas ĉiam.

**Osek u Rokycan** (Ĉeĥoslovakio), So. Alois Muřlač, deziras koresp. per il. p. kartoj kun fremdlandanoj. Certa resp.

**Hora Kutná** (Ĉeĥoslovakio), So. Ferda Langpaul, deziras ekligi rilatojn kun ekstereŭropanoj pri historio, etnografio, religioj.

**Jilemnice** (Ĉeĥoslovakio), So. S. Riedl, stud., koresp. per il. p. k. Respondas ĉiam.

**Jilemnice** (Ĉeĥoslovakio), So. Kolářek, stud., koresp. per il. p. k. Respondas ĉiam.

**Oujezd u Unčova** (Moravio, Ĉeĥoslovakio), Sanatoř »Paseky«. — So. Ant. Uher, rusa legiano, dez. koresp. kun ĉiuj landoj.

**Kroměříž** (Moravio, Ĉeĥoslovakio), Jiráskova 123, — So. Otto Pokorný, měst. úředník, deziras koresp. kun ĉiuj landoj. Resp. ĉiam.

**Split**, Wilsonova obala, Jugoslavio-Dalmatio. Sro. A. Borčić, oficisto ĉe socialna skrb — aranĝas esp. ekspozicion kaj estos dankema al ĉiuj gesamideanoj kiuj sendos afable esperantajojn por ĝi. Ĉiuj ricevos belajn pk. il. el Split.

**München** (Bavorio), Labor. Esp. Grupo (So. Konrad Deubler) Arcisstr. 48/II., serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj, precipe el la kongresurbo Praha.

**Rio de Janeiro** (Brazilio), Rua S. Luis Gonzaga 594, S. Christovan. — So. A. Carvalho, deziras koresp. kun seriozaj fraŭlinoj bohemiaj.

**Örnsköldsvik** (Svedio), So. P. L. Lundqvist, deziras koresp. per p. k. kaj. let.

**Pleven** (Bulgario), Str. Cifte Kafene 26, VII. kv. — So. Gunčo Gunčev, interŝanĝas p. k. il. (marko bildfl.), sigelmarkojn kaj esp. gazetojn. Ĉiam respondos.

**EnBulgarion.** La samideanojn en Bulgario ni atentigas, ke ili povas mendi kaj abonpigi la Progreson ĉe nia reprezentanto So. Georgi Hv. Gaševski (Centra Librejo Esp.), Bul. Marie Luiza 46, Sofia.

Dopisnice s obrazem presidenta

**T. G. MASARYKA**

vydala admin. „La Progreso“

kus 30 hal., 10 kusů 270 Kč, 100 kusů 24 — Kč.

**Eksporto de francaj produktoj** Specialaĵo en likvoroj, fruktoj kun likvoroj kaj siropoj, nutraĵoj, vaskandeloj, konfitaĵoj, fabrikitaj produktaĵoj.

**So. H. Bidaux,** 5. Place d'Aligre, Paris 12e.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.

Esperantistó! Ĉtete knihu Dr. Stan. Kamaryta:

## O DVOJÍ PRAVDĚ

Pro naŝe předplatitele přímo v naší administraci za Kč 12— místo za Kč 14— poštou o Kč 1'65více.

### Knihy, jež možno obdržeti v naší administraci.

(Při objednávce poštou nutno připočísti poštovné).

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný . . . . . Kč 7.50  
Slovník esperantsko-český, brož. . . . . Kč 5.—  
Časopis »La Progreso«, roč. 1918 . . . . . Kč 4.50  
Časopis »La Progreso«, roč. 1919 . . . . . Kč 6.—  
Tittl: Krátká mluvnice Esp. . . . . Kč 0.30  
Čejka: Slovník esp.-čes., brož. . . . . Kč 7.50  
Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár. . . . . Kč 0.80  
Jazyk všeslovanský a Esp. . . . . Kč 0.20  
Kühnl: Úplná učebnice esperanta:  
a) vázaná v plátěném hřbetě . . . . . Kč 14.40  
b) vázaná v papíru . . . . . Kč 12.—  
c) celoplátěná vazba . . . . . Kč 16.40  
Kühnl-Procházka: Slovník česko-esper.:  
a) vázaný v plátěném hřbetě . . . . . Kč 21.60  
b) brožovaný . . . . . Kč 18.—  
c) celoplátěná vazba . . . . . Kč 24.—  
Vortoj de Zamenhof, na obyčej. papíře . . . . . Kč 4.50  
Vortoj de Zamenhof, na lepším papíře . . . . . Kč 6.—  
Sherlock Holmes . . . . . Kč 4.50  
Výtah z Kotzina: Na obranu esper. . . . . Kč 2.40  
Gvidlibro tra Praha . . . . . Kč 3.60  
Klíč esperanta . . . . . Kč —30  
Co je esperanto . . . . . Kč —20  
Časopis Českých Esperantistů, ročníky I.—VIII., po . . . . . Kč 5.—  
Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo . . . . . Kč 12.50  
El proksima oriento . . . . . Kč 9.—

**V**ia horloĝo iros precize se vi ĝin donos por rebonigi al

**Fr. Novák,**

horloĝisto en Prahal. Malé nám. 10.

Magazeno de horloĝoj kaj juveloj. — Vendejo de esper. signoj de Esper. klubo en Praha.

